

Kurta biografio

Mi naskigxis en Odeso 30. 03. 1936 j. Kiam komencigxis milito mi kun patrino gxis 1944 j. estis en milita sanitara tacxmento, kie sxi laboris kiel tajpistino. La tacxmento situis en diversaj urboj: Donecko, Lugansko, Pavlogrado, Stalingrado. Al Odeso ni revenis posi gxia liberigxo en 1944 j. Lernejon finis en 1954j. Militservis de 1954 gxis 1957 jj. Laboris en geologa ekspedicio de Odesa proekta instituto kaj kiel laboristo en uzino “Metalindusriagxo” . En 1965 j. finis filologian fakultaton de Odesa universitato nome de I.I. Mecxnikov. Laboris kiel instruisto de rusa kaj ukraina lingvoj en Kremidovka mezlernejo de Odesa regiono. Instruis rusan lingvon en odesa nafta teknika lernejo.

En 1963-1995 jj. mi laboris en Odesa respublika libroeldonejo ”Lumturo” (“Majak”), kiel korektoro, redaktoro, estro de redakcio. Redaktis pli ol 300 librojn de diversaj gxenroj.

En 1995—2002 jj. — metodisto de historia fakultato de Sudukrainia pedagogia universitato nome de K.D. Usxinskij.

De juneco verkis poemojn, publikigis ilin en lokaj gazetoj kaj jxurnaloj.

En 1977 j memstare ellernis Esperanton. Vizitis Odesan Domon de sciencistoj, en kiu estis Esperanto-kolektivo, kiun gvidis N. Sigal. Konatigxis kun imenentaj esperantistoj – Sergej Rublov kaj Aleksej Versxinin. Komencis partopreni SEJTojn en Poltavo, Degestano, Kujbisxevo, Volgogrado ktp. Vizitis Cxebaltajn tendarojn en Riga, Kaunas, Tallinn pli ol 10 fojojn, en Krimeo multfoje “Aroman Jalton” kaj “Veluran sezonon”, elpasxis en Arteko. Kaj cxiam prezentis odesan deligacion, kiu partoprenis en koncertoj kaj plenumis novajn originalajn kaj tradukitajn esperantajn kantojn kaj poemojn.

Kune kun F. Bersxadskij kaj A. Tiker organizes 24 Odesa-Kisxinevajjn (printempe) kaj Kisxineva-Odesajn (autune) renkontigxojn.

De 1986 j. – membro de jxurnalista unio de USSR, de 1991 j. - membro de ukraina jxurnalista unio. Publikigis siajn artikolojn kaj versajxojn en ukrainiaj kaj eksterlandaj gazetoj kaj jxurnaloj.

Esperantigis poemojn de T.Sxevcxenko (okupis la 1 lokon en konkurso “Ukraina lingvo – lingvo de unuigxo” en 2015 j.), L. Ukrainka, O . Vlizjko, tradukis el rusa, araba, hebrea, pola, angla, franca, germana, gagauza lingvoj. Tradukis al Esperanto pli ol 200 kantojn. Mi estas aŭtoro de 7 poetikaj libroj: “ Odesaj kantoj”, “Fajro de amo”, “Kreado” (Krono de

sonetoj), “Hebrea hejmo”, “Profetagxo”, “Novaj tradukoj el “Kobzar” de T. Sxevcxenko,”Beleco” (Krono de sonetoj).

Partoprenis UEA-kongresoj en Varsovio kaj Vilnuso.

En 1994-1998 jj. estis redaktoro de jxurnalo “Kara lingvo”. De 1997 j.kaj gxis nun mi gvidas literaturan studion en Bonfara odesafonduso “Hxesed”. De 1986 j. mi gvidas Odesan urban Esperanto-klubon “Blanka akacio”. Estis Prezidanto de Ukraina Esperanto-asocio en 2006-2009 jj.

De 2006 j. mi organizas literatur-muzikajn programojn, elpasxas kiel autoro kaj plenumanto de lirikaj kantoj kaj romanoj. Estas diplomanto de Internacia kanta festivalo “Muzika leono” (Lviv, 2007 j.) .

De 1998 gxis nun estas cxefredaktoro de odesa gazeto “Bona faro” («Доброе дело»).

Semen Vajnblat